Por fari krisnaskan patron

Prenu kvadratan ruĝan paperon kaj alportu la kvar verticojn/angulojn sur la centron.
--->nova kvadrato, ĉu?
Returnu vian laborajĵon kaj denove alportu la kvar verticojn/angulojn sur la centron.
--->jen nova kvadrato, ĉu ne?
Denove returnu vian laborajĵon kaj alportu la kvar verticojn/angulojn sur la centron.
--->ankoraŭ nova kvadrato, ĉu?
Returnu vian laborajĵon kaj, se vi bone laboris, vi observas kvar kvadratojn (vi aranĝu por ke unu estu supra, unu maldekstra, unu dekstra kaj la kvara malsupra).

Ĉiu el tiuj kvadratoj prezentas al vi fenditan diagonalon kaj sur la centro unu verticon , ĉu bone? Nun ni okupiĝu pri la maldekstra kvadrato: enŝovu vian montrofingron en la aperturon de la diagonalo kaj maldekstren tiru la centran verticon por formi rektangulon. Same ŝanĝu la dekstran kaj la malsupran kvadratojn, tiel formante rektangulojn.
--->Jen kvadrato kies tri lateroj (la maldekstra, la dekstra kaj la malsupra) estas komunaj al la tri rektanguloj, kaj supre ĝin parte kovras la netuŝita supra kvadrato, ĉu? Tiu supra kvadrato fariĝos la kapo de la kristnaska patro. Do en la rektanguloj vi divenas la du brakojn kaj la piedon.

Ni rigardu la du brakojn: sur ĉiu videblas tri trianguloj, ĉu bone?
Por beligi la kristnaskan patron, puŝu la malsupran triangulon de la dekstra brako internen en la rektangulon kaj puŝu la supran triangulon de la maldekstra brako internen en la rektangulon. Por finlabori la kristnaskan patron, gluu peceton de blanka papero por ke la kristnaska patro havu blankan vizaĝon kaj ne ruĝan, gluu iom da vato ĉe la mentonopinto (por la barbo) kaj ĉe la ĉapelo.
Ankaŭ iom da vato por la manikrandoj, la du ŝuoj. Pretigu elpaperan dorsokorbon kiun vi fiksos ĉe la dorso kaj jen la kristnaska patro estas preta por trairi de kameno al alia ;-)

Fonto www.corobu.com/kpatro.html